

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, War-
szawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, Barcelona
H. Fischer, grandindustri-
isto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirek-
toro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Posteekonto Köln 7086, por
Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanol.

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonoj ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 1500 Kr.	Belga 0.60 Fk.	Brita 3/4 P.	Bulgara 4 Levul	Dana 0.30 Kr.	Estonoj kaj latvoj
Ĉeĥosl. 1.20 Kr.	Finna 1.20 Fmk.	Francia 0.60 Fk.	Germana 600 Mk.	Hispana 0.30 Pes.	Hindia 0.06 Dol.
Hungara 50 Kr.	Itala 0.80 Lit.	Japana 0.10 Jen.	Jugosl. 2 Din.	Kanada 0.06 Dol.	Latvioj kaj litvoj
Litova 25 C.	Nederl. 0.15 Hfl.	Norvega 0.30 Kr.	Pola 400 Mk.	Portug. 0.60 Esk.	Rumania 4 Leol
Rusa 200 Gmk.	Sveda 0.24 Kr.	Svisa 0.30 Fk.	U. S. A. 0.06 Dol.		

Estojn kaj latvoj demandu la prezon de sia Abono. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Pk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 avisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

ATENTO

al la
NOVAJ
TARIFOJ

ŝparas
demandojn
kaj
respondojn.

N-o 124 :: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 18. II. 23.

Aktualigi nian semajnan gazeton.

(Iom akra, sed tute bonintenca artikolo.)

Granda manko de la Esperantista gazetaro estas: la manko de pritraktado de aktualaj, nuntempaj, kiuj nin ĉiujn interesas. La fonton de tiu manko mi vidas en la tielnomita neŭtraleco de Esperanto, kiun per grandaj literoj portas sub la titolo la Esperantistaj gazetoj. Ni ne devas rigardi la neŭtralecon kiel malpermeson paroli en Esperanta lingvo pri internaciaj politikaj, sociaj aferoj, ĝi estas nur devo por ni rigardi ĉi tiujn okazintaĵojn per supernaciaj okuloj kaj skribi pri ili en supernacia senco, celante montri la veran bildon, kiun ni en naciaj gazetoj pro mil kaj mil kaŭzoj ne ĉiam trovas. Esperantista gazeto, ĉefe tiu, kiu estas semajna, neŭtrala kaj volas esti interesa, devas pritrakti apud la ĉefokazintaĵoj de Esperantujo ankaŭ (kaj ne nur flanke) la okazintaĵojn de la tuta mondo, de la politiko internacia, socia, ekonomia vivo kaj literaturo, arto.

La plej grandan parton de l' Esperantistaro ne interesas ke, kie, kiam, kiel kaj kial kunvenas la tri (ĉefindaj) anoj de la Minesciaskiavilaga Esp. „grupo“ kaj kiun el la tri la du aliaj kiel prezidanton elektis; eĉ min, kaj ankaŭ certe la aliajn ne interesas la bela bildo montranta japanan knabinon, titolita: „Japana studentino lernas Esperanton“ (se mi estus malica homo, mi povus diri: kiun bildon oni vidis dum la jaroj de l' japana-rusa milito en „L'illustration“ super la subskribo „Japana studentino lernas pri la herooj de japanaj soldatoj antaŭ Port-Arthur“), kaj min tute ne entuziasmigis la bildo „Esperanto inter la infanoj“, sur kiu mi vidas ducent studentojn, el kiuj unu havas en sia mano ekzemple „Esperanton Triumfontan“ kaj rigardas per milda rigardo en la fotografmaŝinon, ĉar mi scias — el propra sperto — ke el la ducent infanoj, inter kiuj estas Esperanto, nur du aŭ — eble — tri parolas Esperante. — Ni ŝparu la malgrandan, karan lokon de Esp. gazeto!

Sed mi diras, karaj samideanoj, kio min interesas. Min interesas sensacia, originala raporto pri la Lausanne-a konferenco, intervjuo de s-o Lloyd George al la kunlaboranto de „Esperanto Triumfonta“ pri vivantaj politikaj, ekonomiaj demandoj (aŭ eĉ pri Esperanto), intervjuo, kiun donis speciale por Esp. gazeto Anatole France, Gerhard Hauptmann pri literaturo aŭ Kemal Paŝa pri siaj celoj, agadoj.

Ĉar tiujn sensaciajn artikolojn Esp. gazeto povas plej facile akiri, sen granda (por malbonvalutuloj miliona) monfero, kiun naciaj gazetoj devas elspezi per la sendo de speciala raportisto al ĉi interesa okazantaĵo. Esp. gazeto nenien devas sendi sian ĵurnaliston (ĝi eĉ ne povas sendi pro materialaj kaŭzoj), sed Esp. gazeto havas ĉie sian kunlaboranton, nur oni devas organizi kaj la gazeton kun iom da antaŭvido redakti. Mi povas ekzemplon doni, kia granda, neluzita forto kuŝas en la mondorganizado de l' Esperantistoj. Jen la fakto: Kiam la lasta hungara reĝo Karlo de Habsburg estis ekzilita al Madeira-insulo, lia sorto tre interesis grandan parton de l' gazetlegantaro. La hungaraj gazetoj, nature, je la nunaj valutaj cirkonstancoj ne povis sendi specialan raportiston al Madeira, kvankam ĉiu gazetredaktisto sciis bone, ke tiu gazeto, kiu raportos plej frue kaj originale (do ne nur laŭ la telegrafagentejoj) pri la alveno kaj vivo de la eksreĝo sur la ekzilitinsulo, iu gazeto havos grandan moralan — eĉ materialan — profiton. — Nun, mi volis montri al de mi konata gazetredaktisto (de unu el la plej grandaj Budapeŝtaj maten-gazetoj), ke Esperanto havas jam iom praktikan valoron, kaj diris al li: „Sinjoro, mi ekhavigos al vi originalan raporton.“ Mi simple, nekonekte skribis (kiam la eksreĝo enŝipiĝis je la Nigra Maro) al s-o Ernesto Cezar Pereira, delegito de UEA en Funchal — al kiu mi devas ĉi-loke publike danki sian bonvolon —, rakontis al li la aferon, kaj ses tagojn post la alveno de l' eksreĝo en Funchal mi havis jam en Budapeŝt la sensacian raporton, pro kiu la tuta hungara gazetaro envias tiun gazeton, kiu publikigis ĝin. De tiu tago Esperanto havas estilon en la redakcio.

Mi volis nur montri, je kia ofero estas preta Esperantisto, por efike propagandi Esperanton en nacia ĵurnalo, kaj kia infanludo estas por Esp. gazeto ekhavi raportojn pri internaciaj interesajoj. Ekzemple mi demandas: Kial ne havis ET raportiston lokan en Lausanne dum la konferenco aŭ kial ne en Konstantinopolo aŭ Angora, kien kun interesiĝo rigardas la tuta mondo? Kion la naciaj gazetoj nur per grandaj monferoj povas akiri, Esp. gazeto akiras per simpla letero al lokaj Esperantistoj. Ĉar certe estas inter ili ĵurnalistema homo, kiu povas kaj emas fari intervjuojn kun kompetentaj personoj aŭ priskribi la okazintaĵojn en originalaj artikoloj. Esperantista gazetredaktisto povas kalkuli inter sian kunlaborantaron ne nur tiun Esperantiston, kiu memvole skribas la artikolojn, sed ĉiujn ŝamurbajn samideanojn, kiuj helpas al li akiri informojn ktp.

Eĉ se ne ekzistas ĵurnalistema homo (sed tio ne estas fakto, ĉiu homo — ĉefe Esperantisto — havas gazetiskriban febron), konata ŝamurba profesia ĵurnalistaro faros plezure artikolojn, ĉar por li estas reklamo sian nomon konatigi eksterlanden. — Tiun oferon: repagi la poŝtelspezojn (ĉar alian pagon ne petas Esperantistoj) devas la oferi redaktejo, kiu volas doni viglan gazeton al siaj legantoj.

Oni devas eduki Esperantistajn ĵurnalistojn! Tia gazeto, kiel „Esperanto Triumfonta“, devas havi bone organizitan kunlaborantaron en ĉiuj ĉefaj urboj, kiuj havas interrilatojn kun politikaj, ekonomiaj, literaturaj rondoj kaj povas ricevi detalojn, intervjuojn pri aktualajoj.

Ni devas krei internacian publicistikan literaturon per Esperanto! Mi jam je la ekiro de ET proponis al la s-o redaktoro, ke la ĉef-artikolo de la gazeto pritraktu ĉiam politikan, socian, artan ktp. aktualajn. La Esperantista publicistiko estus kontrolo de la nacia, ĉar en ĝi ĉiuj nacioj povas eldiri sian opinion kaj tiel egaligi la partieron de la naciaj gazetoj, nacia publicistiko. La ĉefartikolo (kaj plej granda parto) de Esp. gazeto ne devas ĉiam temi nur pri io-ŭfo, UEA, ETC, RBO, LOCOGO (la diablo scias ĉiujn mallongigojn skribi), pri legolibroapero ktp. kaj ne ĉiam finiĝi per la vortoj: „En la mondon venis nova sento“ (mi eĉ ekdubas, se mi tiun frazon tiel multfoje nur aŭdas), sed prenu la kuragon elmontri per Esperanto al la tuta mondo la kaŭzon de la nova Orienta milito, kiun oni povus regajni por la tutmonda ekonomia vivo la energion de Ruslando, aŭ la influon de la novaj anglaj deputatektoj al la estonta mond-politiko.

Tiam, estimataj sinjoroj redaktistoj, ankaŭ la naciaj gazetoj volonte transprenos artikolojn el viaj gazetoj, menciante la gazeton kaj Esperanton (granda propagando), sed mi povas diri, ke neniu gazetredaktisto reaperigas volonte el la Pollanda letero, kiom da novnaskitoj estis dum la tri lastaj monatoj en la gubernio de Lodz aŭ el la Palestina letero, ke apud iu farmo (200 kilometrojn malproksime de Jerusalemo) du hebreoj kaj du araboj ekkoleris unu je la alia, sed mortigado — ho kia felico! — ne okazis. — Ne, tion ne transprenos la naciaj gazetoj, kiel ajn klopodos nia diligenta samideano, ĉar en Brazilio oni ne interesiĝas pri la nombro de la Lodzuberniaj novnaskitoj kaj en Rusio pri la incidento de la kvar samrasanoj.

Mi do petas la Esperantistan redaktistaron, kaj ĉefe s-on redaktoron de nia semajna, centra gazeto, vigligu, aktualigu vian gazeton, por ke ĝi vere estu nia centra, boninforma, valora, ĉiam aktuala gazeto.

Ekiru la Esperantlingva, internacia publicistiko!

Mi atendas skribajojn de kun- kaj kontraŭ-opiniantoj.

Endre Hevesi.

La Manko de Militismo en la Skolta Movado.

La skolta movado jam disvastiĝis amplekse tra la mondo, sed eĉ nun multaj personoj ankoraŭ persistas konservi en siaj cerboj la ideon, ke la movado estas milita. Tiu ideo estas la rezulto de nescio, kaj estas devo de tiu, kiu scias la verajn faktojn, publikigi ilin por la informo de tiuj kontraŭuloj.

Sub ĉi-supra titolo la „Skolta Ĉefulo de la Tuta Mondo“ skribis la sekvantajn vortojn en „Headquarters Gazette“ („Ĉefsideja Gazeto“) 14. sept. 1922.

„Mi esperas ke unu rezulto de la jamboreo estos, prui al la publiko ke ni ne estas milita organizaĵo. Estas ja nature, ke oni imagas, ke ni inklinas tiudrekte, kiam oni rimarkas la nomojn de tiel multaj soldatoj, kiuj helpas nin antaŭenigi nian movadon.

Tamen, kiel mi ofte jam diris, maljuna cirka ĉevalo povas fariĝi sufiĉe utila komerca veturilo ĉevalo, kiam finiĝas ĝia kariero sur la seĝpolvo, kaj la antaŭa soldato fariĝas ne pli malbona civitano, kiam lia eksigotempo venas. Tiu kiu antaŭe deĵoris en la armeo, konas, pli bone ol iu ajn civitano, la malbonojn krom la meritoj de soldato kaj militista edukado. Kiel unu el ili mi ja konas kaj jen kiel mi firme instigas nenian militan edukadon por knaboskoltaj.

Bonŝance, ju pli konataj ni fariĝas, des pli klare gepatroj kaj la publiko konstata, ke ni havas neniam da militismo ĉe ni. Ni havas bonajn laboristajn konsilantojn en nia Konsilantaro en s-oj J. A. Seddon, Will Crooks kaj J. Havelock Wilson, kaj ili ja ne estus kun ni, se ni estus iamaniere militaj; nek ni havus la simpatian subtenon de socialistoj kiel s-o Slinn, kiu lastatempe paroladis tiel forte, favore pri la geskolta edukado.

Unu el la plej bonaj pruvoj de nia malmilita karaktero estas la „frapo ĉe la okulo“, kiun ni ricevis lastatempe de la Milita Ministrejo.

Ĉevalvirojn. Ili instruis al mi stajn patrujajn kantojn, kaj la kadeto instruis al mi ludi sur la gitaro, kiun instrumenton li perfekte manuzis.

Neniam mi forgesos pri tiuj belaj ĝojplenaj tagoj! Tialn mi neniam trovis nek antaŭe nek poste. Kia forta — tamen ĝoja melankolio kaptis min, kiam la malgranda Jozefo per voĉo, kiu tremis pro interna sopiro, kantis entuziasmoplenan amkanon aŭ romancon pri la naturbelec de la Valencia valo. Lia kapo ripozis sur la brusto de la pli aĝa frato, la majoro; liaj okuloj estis turniĝintaj al la ĉielo dum la fingroj melankolie sin movis sur la kordoj.

Estis neniam dubo, ke ambaŭ fratoj suferis pro helmveto; tagon post tagon ili estiĝis pli silentemaj kaj pli melankoliaj. Preskaŭ ĉiam ili estis kune, kaj ofte, kiam mi subite surprizis ilin, Jozefo kuŝis plorante en la brakoj de la majoro. Tiu-okaze mi forŝteligis al Petro aŭ al Sanĉo kaj galopis kun ili trans kampojn kaj stepojn.

Unu tagon venis leteroj el Hispanujo kun sciigoj pri la unuaj francaj perfortaĵoj kaj pri la hispana sango versita en Madrido. Ĉielo! kian ekbolen kaŭzis tiu Hlobsciigo! La militistoj ĝis nun tiel bonkoraj, subite ŝanĝiĝis je venĝosopirantaj sovaĝuloj. La teruraj blasfemoj kaj furiozaj gestoj pleniĝis nin je angoro, ĝis kiam ni eksciis la kaŭzon. Eĉ la silentema afabla majoro kunpremis la dentojn pro interna kolerio kaj levis la pugnitajn manojn; Jozefo estis la sola, kiu ne vidigis koleron, sed profundan ruĝigantan ĉagrenon. Tiu sovaĝa bolado ne daŭris multajn tagojn; la uragano kvietiĝis kaj ĝin sekvis ĉagrenplena silentado, kvazaŭ nigraj tondraj nuboj aperis sur la horizonto, pri kiuj oni ne sciis, ĉu ili jam eksplodis aŭ estas tuj eksplodontaj.

Kelkan tempon poste en mezo de nokto subite estiĝis terura bruvo en la kulrejo; mi aŭdis multajn laŭtajn voĉojn kaj inter ili tiun de la majoro. Ĉar mia ĉambro estis super la kulrejo, mi rapide vestis min kaj rapidis malsupren. Kion mi vidis? La majoro, vestita nur per ĉemizo kaj pantalone, kuris ĉirkaŭe sur la planko de unu servistino al aila, petante, krianter, blasfemante kaj preskaŭ senespere pri tio, ke neniu komprenas lin. Tuj kiam li ekvidis min, li rapidis al mi kaj jen kisanter jen ĉirkaŭbrakante min, jen ĵetante min tien kaj reen, li ekkriis hispane:

»Akušistino! pro amo al la ĉielo, akuŝistino! akuŝistino!«

»Por kiu?« mi demandis.

»Por Jozefo!« li respondis.

Mi klarigis tuj al la virino, kion li deziris: sed anstataŭ venigi ŝin, pri kiu li petis, ili forkuris krianter kaj ridante al siaj ĉambretoj.

Per malmultaj vortoj: mi mem devis iri ĉevalojn kaj kun du rajdistoj venigis la akuŝistinojn, kiu loĝis en distanco de nur du paŝloj de nia bieno. Si venis, kaj tuj post ŝia alveno mia patrino ordonis al mi tuj enliĝi.

Kiam en la sekvinta mateno mi malsupreniris en la kulrejon, la domon pleniĝis la por mi neklarigebla novaĵo, ke la kadeto estis naskinta infanon.

Kiel mi poste eksciis, la alivestita kadeto estis la majoredzino, kiu kontraŭ la volo de sia patro sekrete estis forkurinta kun sia amato por edziniĝi kun li en Italio. Tiu ĉi estis malamanto de ĉiuj francoj. Tiu kontraŭe fervora Jozefino kaj samtempe regimentsistiro ĉe la hispana regimento en nia lando: Pro tio Jozefo konservis la unu fojon surprizitan alivestadon.

Jozefa.

Rakonto, verkita en la jaro 1824 de St. St. Blicher.

Tradukis el la dana lingvo:
H. J. Bullhuis, L. K.

I.

La hispanoj.

„Estis je la fino de l' vintro en la jaro 1808,“ tiel rakontis la juna kavaleri-kapitano W., „ke mi kiel 15-jara knabo, en akompano de la administranto de la bieno K...d, rajdis sur la vojo al Viborg, por iri renkonte al la atendataj hispanoj.

Blovis akra sudorienta vento, kiu kvazaŭ duobligis la froston; la rapidaj piedbatoj de la ĉevaloj disrompis la glacilon en la profundaj radokavoj.

Miaj atendoj estis streĉitaj en plej alta grado; sur la supro de ĉiu monteto mi levis min sur la selo, por ekvidi la fremdajn gastojn kaj por ekscii, ĉu ili vere similas tiujn, kiujn mi estis vidinta sur la gravuraĵoj en Don Kihoto.

Fine ili alvenis — la kavaleri-rigimento El Rey — malrapide rajdante sur siaj nigraj andalusaj ĉevalviroj. Rapide ni ekhaltis sur la ŝtupo por rigardi ilin dum ili preterraĵdis.

Mia ŝanĝema, timema rigardo vagadis de la rapidaj, kuraĝaj, noblaj ĉevaloj al la brunaj, kotmakulitaj kavaliroj, vestitaj per belaj uniformoj. Surdigite de la nekutima vidaĵo mi sekvis ilin al la bieno, kie la regimento ekhaltis kaj disiris por esti enloĝigata en la ĉirkaŭaj vilaĝoj.

Ni akiris unu majoron, unu kadeton kaj iliajn servistojn, kune ses rajdistojn. La majoro estis juna, bela viro kaj blonda kiel lu el la nordaj landoj, la kadeto estis juna knabo je mia aĝo, kun vizaĝo kiel lakto kaj sango — kiel estas skribite en la romanoj. —

»Tiaj brunaj okuloj, tiaj malhelaj arkformaj brovoj, tiaj ruĝaj vangoj,« diris la ĉambristino de mia patrino, »neniam estis vidataj en Jutlando.« Lia milda, kvankam iom melankolia vizaĝo fliris min al li; kaj li estis la unua, kiun mi kuraĝis saluti hispane: »Estu bonvena, via moŝto!«

Inter la libroj postlasitaj de mia mortinta onklo, mi estis trovinta kelkajn hispanajn, inter kiuj ankaŭ »La fama vivo kaj la famaj faroj de l' kavaliro de Manĉujo«. Ĉe la unuaj famoj pri la enmarŝo de la hispanaj soldatoj en mian landon, mi tuj per ĉiuj miaj fortoj dediĉis min al la studado de ilia lingvo, kio estis al mi tre facila, ĉar mi estis sufiĉe lerta pri la franca kaj krom tio, mi posedis francan-hispanan leksikonon kun aldonita elparolo. Apenaŭ mi finis mian hispanan saluton, la kadeto paliĝis — pro ĝojo, mi supozis — kaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj; sed la majoro ĉirkaŭbrakis min kaj kvazaŭ atakis min per fluo da vortoj, kiuj tiel rapide estis dirataj, ke mi povis kompreni nur la duonon.

Honte kaj balbutante mi petis, ke li parolu pli malrapide.

»Kun plezuro,« li ekkriis, »vi kara knabo! Ni ja bone komprenos nin reciproke! Post semajno vi estos perfekta hispano!«

Ni do konatiĝis, aŭ pli ĝuste dirite: kora amikeco estis naskiĝinta inter la dana knabo kaj la hispanaj militistoj. Mi estis lia kunulo kaj preskaŭ seninterrompe estis ĉe ili. Kiam la oficiroj ellasis min, la kavaliroj tuj min kaptis kaj esprimis siajn ĝojojn kaj miron per plej entuziasmaj ekkrioj. Antaŭe mi sentis kaŝitan timon je ponardoj kaj tranĉiloj, sed ĝi baldaŭ malaperis kaj ĝin anstataŭis konfido kaj sindono. Mi devis partopreni iliajn ludojn kaj dancojn; ili instruis al mi raidi kaj per hispanaj alparoloj obeigi la malfacile direkteblajn

Kiam ni sciigis, ke dudek ses diversaj fremdaj nacioj estis sendonaj kontingentojn al nia ĵamboreo, kaj multaj el ili tre grandajn kontingentojn, ni iom embarasiĝis, kiamaniere enloĝigi ilin, ĝis ĝenerala oficiro proponis pruŝtedoni al ni armeajn tendojn kaj kabanajn. Sed tuj kiam ĉi tio atingis la orelojn de la Armea Konstantaro, ili tuj pereigis la ideon. Kial? Ĉar ni ne estis registritaj nin kiel kadetojn sub la Milita Ministrejo.

La fondintoj de la Skolta Esperantista Ligo bone scias la verajn internajn pacidealojn de la skolta movado. Tial ili penadas kunligi ĉiujn geskoltojn kaj simpatiantojn, kiuj estas ankaŭ Esperantistoj, por disvastiĝi la lingvon de paco inter la skolta gefrataro de la mondo. Ni kredas, ke ju pli granda fariĝos nia lingvano, des pli baldaŭ la skoltaj estroj devos oficiale alpreni Esperanton. Tial ĉiu skolto, skoltino, eks-skolto, eks-skoltino kaj simpatianto, kiu sincere volas labori por daŭra mondopaco kaj frataro devus ariĝi al nia ligo kaj kunlabori kun ni en nia granda tasko. Alĝilojn kaj ĉiujn informojn sendos plezure la Ĝenerala Sekretario, Trupestro Norman Booth, M. S. P., Netherton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo. Petu ekzempleron de la SELO, organo de la Ligo.

J. W. Leslie
Propaganda Fakteiro de S.E.L.
Eksterlanda Redaktoro de „The Open Road“.

Scienco.

Solvo de la hieroglifa mistero.

Celante informi niajn legantojn ankaŭ pri la aktualaj interesaroj de la scienca mondo, ni enprezas la sekvantan artikolon, skribitan de Jar. Černý por la plej disvastigita ĵurnalo ĉeĥa Národní Politika kaj montranta la mirindan eltrovon de la homa spirito kiu el origine nekompreneblaj signoj surŝtonaj scias legi la historion de la popoloj vivintaj multajn jarmilojn antaŭ nia epoko.

En la lastaj tagoj pasis ĝuste cent jaroj de la tempo, kiam la publiko estis sciigita pri ago de la homa spirito rajte komparata kun la grandaj eltrovoj natursciencaj kaj teknikaj en la pasinta jarcento. En novembro 1822 en pariza Académie des belles lettres ĝia membro Dacier sciigis, ke Francisko Champollion, 32-jara franca scienculo, sukcesis post longjara klopodo deĉifri la hieroglifon, bildan skribon de antikvaj egiptoj.

Por imagi la signifon de tiu ĉi ago de Champollion por la scienco, estas necese almenaŭ ion diri pri la hieroglifa skribo.

La antikvaj egiptoj uzadis skribon, kiu konsistis el proksimume 2500 bildoj de homoj, bestoj kaj diversaj objektoj, el kiuj 600 estas tre oftaj, sed la ceteraj estas formoj iom ŝanĝitaj aŭ tre maloftaj. La skribo estis ĉizita sur ŝtonojn. La plej antikvajj skriboj konserviĝis el la 5-a jarmilo a. K. La hieroglifaj signoj esprimadis tutajn vortojn aŭ nur silabojn, la tuta skribo-sistemo estis tre malsimpla.

Por povi esti skribata sur egipta papero, la hieroglifa skribo evoluis al la skribo hieratika, plisimpligo de la hieroglifaj signoj, al kiuj ĝi rilatas tiel, kiel niaj literoj skribitaj al la presita. El la hieratika skribo kreigis fine de 9-a jarcento a. K. r. n. skribo demotika (popola), trovata en dokumentoj de la ĉiutaga vivo (kontraktoj, fakturoj ktp.).

Ĉiuj ĉi tri specoj de skribo perelis en la 3-a jarcento p. K., kaj de tiu tempo neniu scias, kio kaŝiĝas en tiu multego da surskriboj sur preĝejoj kaj tomboj, je kiuj Egiptujo estas riĉa. La historio povis diri pri la antikvaj egiptoj sole tion, kion rakontis pri ili la klasikaj aŭtoroj kaj la biblio.

Por kompletigi iliajn nekompletajn sciigojn, estis faritaj jam de la 17-a jc. provo, sed vanaj, deĉifri la hieroglifojn kaj havigi senperan fonton de kono pri malnova Egiptujo, pri kiu — lulilo

de la eŭropa kulturo, kiel Babilonio — la intereso ĉiam kreskis, ĝis ĝi atingis la supron post la militiro de Napoleono en Egiptulon en 1798. La scienculoj akompanantaj la armeon forportis al si multegon da antikvaĵoj, kopioj kaj desegnaĵoj de malnovegiptaj memorindaĵoj arkitekturaj kaj surskriboj, kiujn ili publikigis en granda verko pri Egiptujo.

Sed intertempe, en 1799, la francaj soldatoj okupitaj ĉe fortikigaj laboroj en Rosette trovis treege gravan ŝtonon, surskribitan per la sama teksto en la skriboj hieroglifa, demotika kaj greka, sekve de kio estis rajtigita la espero, ke oni sukcesos per helpo de la greka teksto trovi ŝlosilon por la parto hieroglifa. Sed, ĉar la hieroglifa teksto estis parte detruita, oni provis unue deĉifri la demotikan skribon kaj en tio rimarkindajn rezultojn atingis la svedo Akerblad jam en 1812. Sed nur en 1819 la angla fizikisto Young finis, komparante la nomon de la egipta reĝo Ptolemaos en la greka kaj hieroglifa tekstoj, la sencon de kelkaj signoj hieroglifaj. Kvankam li solvis tion ne tute precize, tamen li estis jam sur la ĝusta vojo, kaj se li estus uzinta dum siaj studoj pli grandan materialon komparan, li certe akirus la gloron, kiu nun apartenas al Champollion.

Champollion, naskiĝinta en 1790 en Figeac en la suda Francujo, difinis al si la firman celon deĉifri la hieroglifojn jam kiel 12-jara knabo. Li poste studis orientajn lingvojn kaj skribojn, precipe la lingvon de kopioj (kristanaj egiptoj), per kiuj oni parolis de la 3-a jc. p. K. kaj kiun oni skribis per la greka skribo ĝis la 17-a jarcento. Ĝi estis la lasta posteulo de la antikva lingvo egipta. Krom tio Champollion kolektadis diligente ĉiujn sciigojn de la grekaj kaj romaj aŭtoroj pri Egiptujo.

Sed en la afero de la hieroglifoj li restadis longajn jarojn sen sukceso — ĝis la laboro de Young montris al li la vojon al la celo. Kio ĉe Young estis nur izolita, hazarda ideo, tion Champollion tralaboris konsekvence. Li forigis la erarojn de Young kaj montris tute precize, kiuj estas la signoj de sep literoj de la nomo Ptolemaos (p, t, o, l, m, i, s). Tio estis konfirmita per komparo kun hieroglifa nomo de la reĝino Kleopatra, trovita en kopio de greka-hieroglifa surskribo sur iu egipta obelisko. La nomo Kleopatra donis al li pluajn signojn por k, r, e, a. Kun tiuj 11 literoj li kuraĝis solvi pluajn proprajn nomojn, konitajn nur hieroglife, kaj tiel li sukcesis per sencesa komparado deĉifri p'urajn signojn kaj per helpo de la lingvo kopta fiksi signifon de multaj vortoj egiptaj. El sia vojaĝo tra Egiptujo li alportis al si multegon da novaj surskriboj, kaj kiam li en 1832 subite mortis, povis jam esti eldonita laŭ liaj notoj gramatiko kaj vortaro de la malnovegipta lingvo. Kompletaj ili nature ne estis. El la tuta riĉaĵo de la egipta lingvo, la lingvo kopta konservis nur malgrandan fragmenton de vortoj kaj gramatikaj formoj. Tial daŭris ankoraŭ kelkajn jardekojn, ĝis francoj de Rougés kaj Chabas, anglo Goodwin kaj germano Brugsch atingis tion, ke oni povis almenaŭ ĝenerale kompreni pli longajn tekstojn.

Chabas kaj Goodwin dediĉis atenton ĉefe al papirusoj kun skribo hieratika kaj konstatis, ke ekzistas ne sole religiaj surskriboj sur preĝejoj kaj en tomboj, sed ke la antikvaj egiptoj havis ankaŭ rakontojn, poemojn, romanojn kaj librojn sciencajn. Brugsch finis, jam kiel gimnaziano en 1848 deĉifron de la skribo demotika kaj

ante. — La ĉagreno faris ankaŭ min tiel senparola kiel la karan fremdulino.

Mallongan tempon post kiam ili estis forveturitaj, la tuta regimento ekmarŝis kun la ekkrio: Adio! Adio! Espanja! Espanja! Napoleono kaput! Francese kaput! Adio, gute Danese, Adio!

Malĝoje mi per la okuloj sekvis ilin; ili baldaŭ malaperis en la mallumo; nur kelkaj fajreroj de la piedoj de l' galopantaj ĉevaloj montris ilian vojon kaj la bruo, kiu iom post iom plimalaŭtiĝis kaj baldaŭ perdiĝis pro la murmurado de la muelj-radoj.

La fino de l' konatiĝo kun tiuj malproksimaj sudlandanoj havis ion tiel fantoman, ke la tuta ŝajnis al mi sonĝo aŭ feorakonto, aŭ bela teatraĵo, kiam la kurteno estas falinta kaj mi iom revetiĝas, dum la imagata kaj la vera mondo povas akiri tempon por diferencigi unu de la alia.

II.

La stepobrolado.

Dek kvin jaroj pasis de la tempo, kiam mi forlasis K... d. Tri monatojn post la por mi neforgesebla forvojaĝo de la Hispanoj, mia patro sendis min al Kopenhago, por ke mi soldatiĝu en la korpuso de la kadetoj. Mi trastudis la lernejon, faris mian ekzamenon, estis ĝi oficiro kaj kiel tia partoprenis la lastajn batalojn en la milito. Inter-tempo miaj gepatroj estis mortintaj, post kiam ili estis vendintaj la bienon kaj ĝian apartenaĵon je alta prezo kaj faris min, sian solan filon, posedanto de granda kapitalo. Ĉar la servoj en la garnizonoj al mi ne tre plaĉis, mi eksciis kaj eniris la rusan armeon, kiun mi post sesjara servado refoje forlasis kun kelke da ordenoj kaj kelkaj buŝeloj da rubloj. Dum du jaroj mi travagadis parton de Eŭropo kaj en la printempo revenis Kopenhagon. Tiu nekonstanta vivo tedis min kaj

pruis en 1857, ke la egiptoj simile kiel la semidoj indikis en la skribo nur konsonantojn, kaj ke la signoj, al kiuj Champollion kaj liaj posteuloj donis signifon de vokaloj, estas fakte ankaŭ nur signoj konsonantaj. Sur tiu ĉi ekkono, en la lastaj jaroj de la pasinta kaj komence de la nuna jarcento, Erman (profesoro de universitato en Berlino) kaj Seihe (profesoro de egiptologio en Göttingen) konstruis poste la tutan egiptan gramatikon konsiderante la egiptan lingvon parenca al lingvoj semidaj (araba kaj hebrea ktp.). Granda egipta vortaro preparata de kvar germanaj akademiuloj devas fidiĝe difini la signifon de ĉiuj malnovegiptaj vortoj, kiuj konserviĝis.

Tiel post cent jaroj rimarkinde ni proksimiĝis al la celo kompreni egiptajn skribaĵojn sur ŝtonoj kaj papero tiel, kiel ni komprenas surskribojn grekajn kaj latinajn, konatigante, kiel eble pleje, kun la historio kaj kulturo de antikva Egiptujo, ĝia religio, literaturo, vivo publika kaj privata. La memorinda ŝtono, fariĝinta ŝlosilo por deĉifri la hieroglifojn, troviĝas en la Brita Muzeo en London.

Trad. el la ĉeĥa Mla Vokldlová.

Wilhelm v. Röntgen †.

La fama sciencisto kaj inventinto de la radioj X, Wilhelm von Röntgen, naskiĝinta en 1845-a jaro en München, mortis 78-jara.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Ruslando.

En Moskvo 5. nov. en la klubo de laboristoj ĉe Balaŝiha teksfabriko (Moskva distrikto) okazis de 10-jara ekzistado deloka Esp. grupo estis faritaj raportoj de Valentinov, Prager, Begišev, Kopninskij. Ĉe estis preskaŭ 1000 personoj. — En Centra Klubejo de poŝtistoj Esp. lekcio. S-o Modenov raportis pri Universala Esp. Kongreso en Helsinki kaj Berlina poŝtista kongreso. — S-o Javoronkov faris paroladon ĉe la unika en Rusujo radiotelefona stacio pri Esp. inter radio-telefonistoj kaj radiotelegrafistoj. Sekvis kursoj. —

En Balašov (Saratova gub.) fondiĝis grupo „Verda bruo, printempa bruo“. Prez. fino H. Levina.

En Belgorod propagandas S. Ŝišlov.

En Egorjevsk kurso komenciĝis en la lernejo de Aviado.

En Odessa la Esperantistoj klopodas pri ŝanĝo de nomo Arnaŭtskaja strato je strato „Esperanto“.

En Saratov kurso en loka blindulternejo.

En Kamensk fondiĝis nova grupo, organizita de s-o Sidorov.

En Dmitrov kurso de s-ino M. J. Ŝidlovskaja. En Poltorack, Tverj, Devica, Simferopolo, Maloĵaroslavc, Taŝkento, Ribinsk, Kasimov, Voronej, Borzna, Bolĥov, Rjazanj k. a. novaj Esp. kursoj.

Japanujo.

En Tokio konstantaj kursoj sub gvido de s-oj Chif, Oŝaka kaj kvar aliaj samideanoj. Propaganda parolado de s-o N. K. Roscoe ĉe Sannō Hotelo, Ŝiba.

En Ŝizuoka propaganda parolado ĉe Dojin-preĝejo kun helpo de s-o Roscoe kaj s-o Jagi. Ĉeestis pli ol 3000 aŭskultantoj.

En Nagoja kurso de s-o Iŝiguro ĉe la oka kolegio. Propagandaj paroladoj de s-oj Iŝiguro

kaj Satō ĉe Fuĉidaka, Ama-gun, Aĉi. S-o Iŝiguro gvidas kurson dufoje en ĉiu semajno.

En Kioto propaganda ekspozicio en la tria kolegio okaze de gimnastika festago. Kursoj de s-oj Sakurada kaj Okuma por urbanoj en Doda elementa lernejo, kurso de s-o Jagi por studentoj.

En Kobe propaganda parolado en Fremdlingva Lernejo. S-oj Fukuda, Takao, Jagi kaj Ŝahaŝi vizitis la urbon. Ĉeestis 250 aŭskultantoj. Kurso de s-o Takao. Ekskurso de la nove fondita grupo al Kurakuen.

En Hiroŝima propaganda parolado dank' al klopodoj de s-o Maida kaj afabla subteno de la edukadaj societoj urbaj kaj gubernia.

En Okajama vizito de D-ro Ramstedt kaj s-o Jagi kaj propaganda parolado por urbanoj kaj lernantoj de la sesa kolegio. Ĉeestis kelkcent personoj. Kurso de s-o Akaŝi. Fervora propagando de s-o Osaka inter fervoistoj.

En Tojama fondiĝis nova Esp. grupo dank' al klopodoj de s-o Jamada kaj aliaj samideanoj. Kurso de s-o Jamada dufoje en la semajno.

En Macumoto kurso de s-o Juri por pli ol 180 studentoj.

En Sendai kursoj de s-o Kikuzaiŝa, Joŝino, Muto.

En urbeto Ŝiroi propaganda parolado por 200 aŭskultantoj aranĝita de alveturintaj samideanoj el Sendai. Afabla subteno de la Kulturviva Societo en Ŝiraiŝi. Kurso de s-o O. Muto.

En Akita kursoj de s-oj Jokota, Fukai, Imano por viroj kaj virinoj.

En Nagasaki nova grupo en la medicina kolegio. Propaganda parolado de s-o Iŝiguro en Kristana Asocio por junuloj.

En Saseho s-o Iŝiguro, vojaĝante al Nagasaki, survoje faris propagandan paroladon antaŭ 350 personoj. Afable helpis s-o Cugaŝa kaj maroficisto Kuŝaŝima.

En Fuzan (Koreo), fondiĝis nova grupo ĉe la Komerca Lernejo.

Finnlando.

Helsingfors. Sveda Esperanto-Societo Nordlumo festis la datrevenon de la naskiĝo de nia Majstro per fesikunveno en la salono de la uniĝo Östsvensk Samling. La fesi-paroladon, kiu temis pri la vivo kaj verko de D-ro Zamenhof, faris s-o A. Sandström. La ceteran programon plenigis: salutvortoj de D-ro H. J. Runeberg, solkantado, solludo, deklamado kaj fine dancado. La feston vizitis 60 personoj.

La 18. jan. la societo aranĝis publikan propagandan kunvenon kun muziko, kantado kaj propaganda parolado pri Esperanto, kiun faris s-o A. Sandström. Poste komencis novaj kursoj.

La Societo de nun kunvenas ĉiujarde en la ĉambraro de la Sveda Kontorista Societo, Alexandersgatan 16. Duonhoron antaŭ komenco de la kunveno okazas daŭriga kurso por aĵoj-progresemuloj, sub gvidado de Lektoro K. S. Ahonius. La programojn de la kunvenoj ĝenerale plenigas diskutado pri kuranta aferoj, komuna tradukado, laŭleĝo de Esperanta literaturo, raportoj pri noveloj Esperantaj, diskutado pri Esperanta temo, ktp. En komenco de januaro la societo eldonis svedlingvan propagandan broŝureton pri Esperanto, kiel n-on 1. en la serio „Propaganda Biblioteko Nordlumo“. La kunvenojn de la Societo ĝenerale vizitas ĉ. 20 aĵoj.

La 15. febr. la societo ree aranĝos publikan propagandan kunvenon.

Britujo.

En Liverpool nia eminenta samideano profesoro W. E. Collinson akceptis la inviton de la Liverpoola Universitata Aŭtoritato, fariĝi la Honora Profesoro de Komparativa Filologio. Ĝis nun prof. Collinson estis la profesoro por la Germana Lingvo, kies oficon li daŭrigos dumtempe. La honoro al tiu pozicio por nia eminenta samideano, montras la rekonon de la universitataj aŭtoritatoj pri la granda kompetenteco

»Ĉi tie vi ne povas ĉirkaŭveturi,« ekkriis unu el la farmistoj, kiu iris al mi kun forkego sur la ŝultro; »la vento blovas rekte trans la ŝoseon kaj la fajro ĝin atingis ĉe multaj lokoj.«

»Ĉu ni ne povas laŭveturi malrektan vojon?« oni demandis en la antaŭa veturilo.

»Ne,« respondis la farmisto; »marĉo estas ĉe la dekstra flanko; se vi konus la vojon ĉe la maldekstra flanko, vi eble povus laŭiri ĝin; sed tiaokaze vi devus veturi dum kelka tempo transverse trans la stepon, ĝis kiam vi atingos la ŝoseon.«

»Ĉu vi bonvolus montri al ni la vojon?« mi demandis.

»Mi ne povas foriri de tie ĉi pro la komunuma administranto,« li respondis.

»Sed se mi donos al vi bankbileton?« mi diris.

»Tio estas alia afero,« li respondis; »ĉu vi intencas iri Viborgon?«

»Jes!«

La farmisto formetis la forkegon, iris maldekstren tute ĉirkaŭ la fajro kaj petis, ke ni sekvu lin.

Mi unue direktis la veturilon al la stepo kaj la alia veturilo sekvis min; sed kiam mi veturis transverse trans malnovajn radokavojn, pleniĝintajn per vivaj herboj, la vojo estis tre malebena, kaj ĉe tiu malebenaĵo mi aŭdis la ekkrion »ŝu,« eligitan de virino en la alia veturilo. Mi turnis min kaj rigardis poste kaj ekvidis, ke sur ĝi sidas krom la veturigisto maljuna viro kaj juna virino. Mi ekhaltis, elsaltis el la veturilo, iris al ili kaj proponis, ke la veturiloj iru antaŭe, dum ni sekvas piede. La propono estis akceptata kaj mi prezentis mian brakon al la virino.

Ĝis nun mi ne vidis ankoraŭ ŝian vizaĝon, ĉar mi marŝis ĉe ŝia flanko, kiun la fajro ne lumigis,

Paciencon!

Ne evitebla estas nuntempe prokrasto en la alveno de ET, kiel ni jam klarigis en la antaŭa numero. Ĉiu abonanto scias, en kia maldezirinda situacio troviĝas Rejnlando. De nun ni klopodos, ekspedi ETON jam unu tagon pli frue ol kutime, kaj ni esperas, ke tio almenaŭ iom helpos. Se tamen prokrasto okazos, ni petas kore, ke la abonantoj ne plimalfaciligu per senĉesaj plendoj nian certe ne envidindan situacion, ĉar ni ne estas kulpaj pri la prokrasto. Pripensu, ke la fervoraj linioj de okupita Rejnlando ne plu funkcias, escepte la stacio Köln kun la najbaraj stacioj, kaj ke la poŝto pro tio funkcias malrapide. Do, pasiencon!

de tiu en la filologia kampo, kaj estas interese aldoni en tiu rilato, ke prof. Collinson estis proponita antaŭnelonge kiel ano de la Lingva Komitato. Nenlu povos pli bone kaj kapable plenigi lokon en tiu komitato ol prof. Collinson.

La 2. de Feb. la profesoro honorigis la grupon Esperantistan de Liverpool per sia ĉeesto, kiam li faris tre interesan paroladon en flua Esperanto pri la „Origino de Lingvo“. Li klarigis la diversajn teoriojn de Max Müller kaj prof. Jespersen pri la komenco de la homa parolo kaj aldonis multe el sia propra teorio. Sekvis diskuto kaj respondo.

Kelkaj anoj de la Liverpool Rotary Klubo, grava komerca societo, ricevis permeson de la komitato disdoni inter la anoj la ĵus eldonitan raporton de la Generala Sek. de L. d. N. pri Esperanto. La anoj montris grandegan intereson en la Esperanta afero kaj oni atendas gravan helpon de tiu angulo por la movado. J. D. A.

Korekto.

En n-o 123 oni legu sur paĝo 2, kolono 3, artikolo „Antaŭ elektoj por L. K.“, alineo 3: riĝardiant alian rangon (anst. alian rangon); en la anonceto „Die Manneslehre“ legu: Sortoturna (anst. Sportoturna); en la Felietono sur paĝo 1, kol. 3, linio 8: adreson (anst. aduson).

Infanamikoj.

S-o G. van Heek en Hengelo montriĝas vera amiko de Esperantaj infanoj. Li ne nur plenigis la kristnaskan tablon por multaj infanoj, li ankaŭ helpas ebligi la helmvolaĝon de infanoj el eksterlando, li promesis subvencion al „Esp. Vereinigung deutscher Lehrer“, plue li interesiĝas pri eldono de Esp. gazeto por infanoj. — Inter la gesinjoroj, kiuj sendis mondonacon por Esp. infanoj en Weinböhla (Germ.), ankaŭ estis franca oficisto el la okupita teritorio. — Koran dankon al ĉiuj!

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis pluan subtenon: 240. H. Bonnevie, Kristiania, 10 norveg. kr.

Lernejo kaj Komercio.

Lernejo kaj Komercio estas la ĉefaj faktoroj por akceli la finvenkon de Esperanto. Ilin ni devas speciale almiliti kaj persiste „prilabori“ por gajni ilin al nia afero. La Esperantistaro ekonomis tion jam de la komenco, sed ĝis antaŭ nelonge la provoj faritaj tiurilate restis plejparte nur eksperimentoj. Nur lastatempe ni povas noti pli seriozajn sukcesojn, evidentajn faktojn. La Internacia Konferenco pri Esperanto en Lernejoj, okazinta Paskon lasiĵaran — por tiel diri — sub la okuloj de la Ligo de Nacioj, estis la unua vere notinda sukceso, kiu atentigis vastajn pedagogiajn rondojn de la tuta mondo pri la lingvo internacia. Espereble la ba'daŭ okazonta Komerca Konferenco en Venezia rezultigos same evidentan sukceson en komerca kaj turlama aferoj.

sed perfekta bela figuro, kies konturon vidigis al mi la flamoj, instigis min diri al ŝi kelkajn flarajojn, kiel ekzemple, ke nun mi trovas min inter du fajroj (mi iris inter ŝi kaj la fajroj), ke ni tute ne estas en infero, kiel oni certigis antaŭe, ĉar la anĝeloj ne estas tiel malproksimaj, ktp. Miaj elparoloj estis tiel lerte respondataj, ke mi estigis scivola vidi la buŝon, kiu parolis tiel bone.

Subite mi ŝajnigis faleli, por esti devigata turni min al la fajro. En tiu momento mi vidis — Ĉielo! mi vidis veran anĝelon, anĝelon tiel majeste belegan, ke ĉiuj miaj flarajoj, mia tuta kurajo malaperis. Antaŭe mi estis dirinta tro multe, sed nun mi diris tro malmulte, ĉar mi diris nenion. Ofie mi volis rekomenci la interrompitan interparoladon; sed ĉio, kion mi estis povinta diri, ŝajnis al mi nura sensencaĵo. Per malmultaj vortoj: mi povas diri, ke mi preskaŭ opinis esti enamiginta, kvankam ankaŭ alia ekspenso frapis min, t. e., ke mi konis tiun ĉielan vizagon, sed mi ne povis memori, kie mi vidis ĝin la unuan fojon.

Pli kaj pli mi hontis pri mia subita senparoleco kaj kvazaŭ ŝtono falis de mia koro, kiam la samvojaĝantoj de la junulino komencis interparoladon pri la stepa brulado, akompanatan de demandoj, kiujn feliĉe mi kapablis respondi. Tiel ni alproksimiĝis la ŝoseon; sed kiam la junulino ellasis mian brakon kaj saltis en sian propran veturilon, mi havis la senton kvazaŭ de varma ĉambro mi venis en malvarman.

La veturilo malproksimiĝis; ŝi turnis sin ankoraŭ unu fojon, kapsalutis, sed mi restis staranta kaj eble starus tie ankoraŭ nun, se mia veturigisto ne estus demandinta min, ĉu mi intencas veturi plue.

Mi eniris mian veturilon; la aliaj estis jam malproksimaj kaj veturis rapide; sed kvankam tiel kore mi deziris vetur-atinĝi ilin, mi tamen ne pensis pri tio rapidiĝi la veturigiston — kio pravas,

Utile estas, ke en tiu ĉi momento reaperos internacia komerca gazeto sub titolo „Internacia Komercio“. Ĝi estos eldonata kiel monata aldone al „Esperanto Triumfonta“, sed sub sendependa redaktado de l' fondinto de la ĉesigita „Internacia Komerca Revuo“. Al ĉiuj abonantoj de ET ĝi estos liverata senpage (same kiel la „Revuo“), sed ĝi estos ankaŭ aparte abonebla. Pro teknikaj malfacilaĵoj, ankoraŭ pliakrigitaj per la konsekvencoj de la Ruhr-okupado, la eldono de la unua numero bedaŭrinde prokrastiĝis. Ĝi aperos baldaŭ kiel maria numero. La aprila numero supozebla aperos tuj post la Konferenco de Venezia kun detala raporto pri ĝi. Poste „Internacia Komercio“ eliros regule ĉiumonate

Diversaĵoj.

Internacia Ekspozicio pri Militvunditoj kaj Militblindigitoj.

Dum proksima monato aprilo (14.—22.) okazos en Gent Internacia Ekspozicio pri la Laboroj de Militinvalidoj (vunditoj kaj blinduloj).

Ĝia celo estas montri tion, kio estas atingata en diversaj landoj, por instigi je plibonigoj en aliaj kaj ankaŭ atentigi pri tio, kio estas ankoraŭ farota kaj farebla.

Ĝi enhavos jenajn ĉefajn sekciojn:

- Kooperativoj pri produktado.
- Sociaj institucioj (interhelpado, loĝejoj je malkara prezo, lukto kontraŭ kareco de la vivo).
- Reedukado.
- Protezo (artefaritaj membroj kaj korpopartoj) kaj medicina prizorgo.
- Belaj artoj.
- Bibliografio.

La komitato petis la kunhelpadon de subskribinto, pere de Esperanto. Tial mi alvokas ĉiun gesamideanojn: pri kunlaborado per ĉiuspeciala informoj, ŝtatestikaj libroj, legotekstoj, ktp.

Mi speciale akceptis la estradon pri la priblindula sekcio, kie kelkaj blinduloj praktike pruvos, per sia laborado en diversaj metodoj, la taŭgecon de la reedukado.

Okazos ankaŭ kongreso de la reprezentantoj de militblindigitoj el diversaj landoj, kie la praktikal rezultato de la ekspozicio kaj la spertoj el diversaj ŝtatoj estos diskutataj.

Oni bonvole sciĝu pri punktoj diskutindaj, aŭ ensendu raportojn.

Diverslanda kunhelpado, pere de Esperanto, estos utiligebla kiel propagandilo por nia lingvo. Ni praktike pruvu la vivecon de nia idealo!

Informojn kaj cirkulerojn havigas

Hendricx Victor, Zalmstraat 43, Gent, Belgujo.

Mi insiste petas kunlaboranton el Finnlando, Estonujo, Letlando, Latvujo, Pollando, Rumanujo, Portugalujo ktp. Konigu la aferon al vialandaj oficialaj organizaĵoj pri vunditoj kaj blindigitoj. Turnu vin al la fakaj gazetoj. (Kolektoj de tiuj gazetoj estos dankeme ricevataj, ĉu nigreprese, ĉu brilleskribe.)

Esperanto-gazetoj bonvolu represi.

La Lokomobilista Bando („Tractor Squad“). Usona Helpa Klopodado en Rusujo.

Detaloj pri la klopodado de la „Lokomobilista Bando“ („Tractor Squad“), organizita de la Societo de Amikoj de Sovjeta Rusujo en Usono, aperas en la Rusa Aldono de Industriaĵ kaj Laboraj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj.

Laŭ Informo en *Economicheskaja Zhizn* (Ekonomia Vivo), Sovjeta gazeto, la „bando“ konsistas el 20 homoj provizitaj per 21 agrikulturaj lokomobiloj kaj kompletaj agrikulturaj maŝinaro kaj ilaro. Ili alvenis en Rusujo lastan somermezon, kaj estis senditaj al la Gubernio Perm, kie oni asignis al ili teron.

ke io ne estis en ordo je mi; kaj mi preskaŭ supozas, ke mi timis riproĉi lin.

Kvankam post kelka tempo, mi penis pri mia malrapideco, mi konsolis min per tio, ke baldaŭ mi revidos ŝin en la trinkejo. Mi venis tien — sed — ne vidis ŝin. Mi demandis; oni scilis nenion diri — eble ili preterveturis. Mi priskribis la du vojaĝantojn kiel eble plej bone — oni ne konis ilin kaj jen oni supozis tion. Jen ion alian, pro kio mi eĉ pli multe embarasiĝis. Mi volis sekvi ilin, sed kien? La vojo disigiĝis ĉe la trinkejo laŭ tri direktoj kaj kiun mi sekvus? Kolereta, malsata, enamiginta, mi iris dormi, malbenis mian malsaĝecon, ĉar mi eĉ ne informiĝis pri iliaj nomoj kaj loĝejoj.

Daŭrigota.

Spritaĵoj de Nazredin'-ĥoĝa.

Tradukis el serba M. Soloviev.

Antaŭparolo.

Nazredin (kio signifas: ŝtupo al kredo) estis turko. Li vivis en la dekkvara jarcento kaj estis pastro (ĥoĝa) kaj instruisto en Akŝehiro (Blanka Urbo) en Malgranda Azio. Lia nomo estas konata preskaŭ al ĉiu turko, kaj liaj ŝercaĵoj estas rimarkindaj pro siaj orientaj originaleco kaj spriteco.

I.

Oni rakontas, ke Nazredin'-ĥoĝa legadis ekskluzive unu libron „Miftah il ilum“ (ŝlosilo de scienco) kaj pro finferno de tiu libro li estis nomita sanktulo. Dia favoro surverŝu lin! Foje li supreniris la predikejon de ĝamio (muĥamed. preĝejo) por prediki. Li turniĝis al la kunvenintaj verkredantoj kaj diris al ili:

„Ĉu vi, kunvenintaj tie ĉi, scias, kion mi estas predikonta?“

Ĉe alveno tie je komenco de julio, ili tuj kunmetis sian maŝinaron kaj faris loĝtaŭĝaj la asignitajn domojn. La 24. jul. sep lokomobiloj funkciis sur la tero, kiu estis senkultura dum pluraj jaroj. La 15. aŭg. dekkvin lokomobiloj funkciis, kaj la 25. sept. la nombro estis deknau. Oni plugis teron ne nur en la spaco, asignita al la bando, sed ankaŭ en la bienoj de lokaj agrikulturaj societoj. Multe da tero estis plugita por individuaj kamparanoj, kiuj pagis tiun servon per lignoprovizo kaj konstrua laboro.

„Estas sendube,“ diras *Economicheskaja*, „ke la energio kaj iniciatemo de la Usonanoj faras multe por forigi la apation de la Ruĝoj, kiuj interrilatiĝas kun ili, kaj estas speciale laŭ tiu ĉi vidpunkto, ke la Sovjetaj aŭtoritatoj favoras la klopodojn de la Usonanoj kaj laŭeble helpas ilin.“

La „Rusa Aldono“, kiu aperas ĉiusemajne, entenas valorajn informojn pri la situacio en Rusujo, kolektilajn de spertuloj el la ĉefaj Sovjetaj publikaĵoj, el ĉiuj gravaj gazetoj Eŭropaj kaj Usonaj, kaj el ekstere aperintaj Rusaj eldonaĵoj.

Int. Lab. Oficejo.

Nekrologo.

J. W. Sevenhuijsen †, 9. februaro 1923.

Neniam plu ni revidos nian maljunan amikon en nia mezo kaj por eterne silentas lia voĉo, kiu tiel arde kaj entuziasme povis defendi nian aferon. Kiu Esperantisto en Nederlando ne konis Sevenhuijsen, la ĉiam fervoran, ĉiam kuraĝan kaj propagandeman probatalanton? Kaj kiu ne konscias pri la grava perdo, kiun nia movado suferis pro lia foriro.

En la tuta mondo oni konas liajn praktikajn, spritajn desegnaĵojn por la instruo de Esperanto kaj liajn ĝajajn kantojn. La Esperantista Vegetara Ligo kaj la Internacia Asocio de Instruistoj perdas en li sian simpatian prezidanton.

Jam de post la Geneva Konferenco, kie li reprezentis la Nederlandan Ministron de Instruado, same kiel en la Kongreso de Hago kaj Praha, li ne estis la sama kiel antaŭe. Li suferis pro kormalsano, kiu postulis eviton de ĉiu ekscitiĝo. Bedaŭrinde la ripozo ne povis eviti la katastrofon kaj tro frue la senkompata morto forprenis de nian laboremam kaj simpatian amikon.

Al lia vivvino kaj familio ni esprimas niajn profundajn kondolencojn.

J. R. G. Isbrücker

Recenzejo.

LIBROJ.

MARIA MAGDALENA. Kvinakta burĝa tragedio de Friedrich Hebbel. Tradukita de D-ro Adolf Blachitzky, Praha. Rekomendita de E. L. A. Unua eldono, 1922. Eldonejo „Marto“. Haida (ĉeh. slov. Resp.). 80 pg. 11 x 16 cm. Prezo: 4 Kč.

Ekatenos la negermana samideanaro legante la vortojn Maria Magdalena kaj la nomon de l' enlmenta germana klasika poeto Friedrich Hebbel, pensante al ties maletroverko „Gyges kaj lia ringo“ esperantlingve aperinta antaŭ kelkaj jaroj. — Supozante, ke la detale skizita biografio de l' poeto kaj la klarigoj pri liaj verkoj en la antaŭparolo al „Gyges“ estas aŭtĉe konataj, mi nur volas menci, ke ĉi tiu burĝa tragedio estas la plej bona verko el la unua vivperiodo de l' poeto. Li verkis la dramon en Paris en 1844. Majstre li evolvigis la agadon kaj donis pliel trefan karakterizadon de la personoj kiuj kvazaŭ superhomo altenkreas. preskaŭ senlime progresas en sia propra homeco. Ĉiuj tragedioj de l' poeto ne celas esligi kompton, ili volas tamen ekakui la demonecon kaj impresi per la grandeco. — „Maria Magdalena“ estas perfekta en si mem. — Sendube la negermana legantaro komprenos la dramon pli facile ol „Gyges'oni“, t. e. la sillo de la bela lingvo ebligas ĝin pro tio, ke ĝi sin prezentas proze kaj ne rime-rime. — Kompare kun la malfacile tradukebla germana teksto la laboro de D-ro B. estas bona. Kelkloke li ne tute trafis la gustan tradukon ekz. p. 61 „Kiel plaltan aukeron“; la senco estas „kvazaŭ ĝi estas p. a.“ Kelkaj negravaj prezeraroj kaj malkorektaĵoj ne domagaas, ekz. „por-

li respondis: „De kie ni povus tion scii? Ni scias nenion!“

Tiam li diris plue: „Se vi ne scias, estus senutile interparoladi kun vi pri tio,“ kaj li malsupreniris.

La sekvintan tagon li denove supreniris la predikejon kaj diris: „Ĉu vi, kunvenintaj tie ĉi, scias, kion mi estas predikonta?“

Nun ili respondis: „Jes, ni scias.“

Tiam Nazredin' diris: „Nu, se vi scias, por kio mi ripetu la samon,“ kaj denove li foriris. La trian tagon li iris sur la predikejon kaj rlpetis sian demandon.

Sed la aŭskultantoj, laŭ antaŭa interkonsento respondis: „Unu el ni scias, aliaj ne scias.“

Tiam Nazredin'-ĥoĝa trankvile diris:

„Estas bonege. Nun la sciantoj rakontu tion al la nesciantoj,“ kaj denove li iris for de la predikejo.

II.

Nazredin'-ĥoĝa rostis anseron forportolan al kadi (juĝisto). Dumvoje li malsatiĝis kaj formangiis unu piedeton de l' ansero. Atinginte la juĝejon li metis la pladon kun la ansero sur la tablon antaŭ la juĝisto; la lasta demandis lin, kie estas la dua piedeto de l' ansero. Nazredin' respondis: „Niaj anseroj havas nur unu piedeton; se vi ne kredas, rigardu tien!“ kaj li montris grupon de anseroj, kiuj ĵus staris sur la herbejo antaŭ la juĝejo; ĉiu ansero staris sur unu piedeto.

Sed laŭ ordono de l' juĝisto oni dispelis la anserojn per bastono, kaj ili ĉiuj forkuris sur anibaŭ piedoj.

Tiam Nazredin' diris al la juĝisto: „Se oni vin pelus per tia bastono, vi forkurus eĉ sur kvar piedoj!“

III.

Iunokte Nazredin' ekdisputis kun sia edzino. Ŝi koleriĝis kaj puŝis lin per piedo tiel forte, ke li malsuprenruliĝis la ŝtuparon.

sanigan“ anstataŭ simple „sanigan“. Bela vorformo estas „bolĝi“. — Ni danku la tradukinton, ke li konigas valoran germanan klasikaĵon al la internacia samideanaro. Ne malpli bonaj estas multaj aliaj dramoj de Hebbel vere indaj esti tradukataj. — Menciinde estas, ke la poeto dediĉis sian verkon al la reĝo Christian VIII de Danlando, kiu malavare estas helpinta kaj aŭtentinta la malriĉan mizere vivantan poeton. (G. Ajul.)

GAZETOJ.

Kataluna Esperantisto, jan.
La Revuo Orienta, dec.
France-Esperanto, febr.
Novaj Tempoj, jan., febr.
Itala Esperanta Revuo (L'Esperanto), jan.
Holanda Esperantisto, 8. febr.
Katolika Mondo, febr.
Internacia Medicina Revuo, kajero 1.
Bulgara Esperantisto, jan.
Corriere Balcanico-Esperantista, dec.

Leterkesto de ET.

Aŭ. D. Aŭ. Sofia. — La interesa ĉapitro el viaj „Rememoroj“ aperos baldaŭ. Dankon pro kunlaboro!

L. M. en Vorderbruck. — Ambaŭ leteroj de 4/1 kaj 28/1 kun mono bone alvenis. Espere ankaŭ la gazeto atingos vin regule ĝis 171.

R. Hr. en Praha. — Dankon! Ni tre ŝatas popol-sciencajn kaj teknikajn artikolojn.

Listo de la donacintoj por la XV-a.

Donaca Kaso.

50 gmk. aŭ malpli:

Bode en Karlsruhe, Stioffregen en Grossrhduden, Gabelmann Schaefer en Freiburg, Hahn en Bremen, Konz en Stuttgart, Wendler en Leipzig, Hederich en Hannover, s-ino Hederich en Hannover, R. B. en Köln, Wolfson en Berlin, P-hle en Dresden, Rögner, Gibrind en Flrth, Kellhack, Mengele, Hendrich en Flrth, Schmidt en Beuthen.

100 gmk. aŭ pli:

Becker en Breslau, Ledermann en Lohr, Scheibler en Wurgwitz, Aron en Königsberg, Rauch en Hamburg, v. Lidl en Vordernberg, Turlo en Szeged, Koch en Katowice, Bachmann en Heilbronn, Christaller en Stuttgart, Berger en Waldahut, Schenkel en Friedrichshal, Kilem en Striegau, Küttner, Ellissen en Mannheim, Bernhard en Friedrichshal, Bösenberg en Do-fkemmatten, Pfaffenberger en Nürnberg, Marich en Budapest, Löblscher en Berlin, Brandt en Düsseldorf, Urban en Breslau, Šapiro en Bialystok, Düffels en Emmerich, Proire en Dresden, v. Marich en Budapest, Omilor en St Ingbert, Kitter en Berlin, Saphra en Annaberg, Iahn en Godesberg, Bohner en Breslau, Hochbruck en Düsseldorf, Witbrodt en Neukölln, Popp en Mylan, Sterk en Merseburg, Dr Werdlie en Regensburg.

200 gmk. aŭ pli:

Bauernfreund en Nürnberg, Sandrock en Easen, Neuwirth en Bregenz, Goldmann en Berlin, Kolb en Ldwigshaven, Bederlunger en Innsbruck, Nuding en Schweinfurt, Lorenz en Reichenbach, Maurer en München, De Rycke en Gent, Lindequist en Berlin, Kraft en Braunschweig, Miĥan en Dresden, Torach en Peggitz, Lange en Nieswiez, Jorewitz en Hattengen, Robin en Warazawa, Adler en Königsberg, Roaner en Chemnitz, Budert en Chemnitz, Fielacher en Beuthen, Relasauer en Wien, D-ro Schwarz, Bayer en Budapest, Rother en Crefeld, Schwarzschild en Berlin, Buckl en Nürnberg, Nazarevyyĉ en Stanistawowo, Tichewski en Kattowitz, Soltykevyyĉ en Praha.

1000 gmk. aŭ pli:

Döring en Freiburg 5000.—, Epstein en Hamburg 1000.—, Esperanto Verlag Friedr. Ader en Dresden 2000.—, Wüsten-dürfer 1000.—, Chiba en Wien 1000.—, Beck en Augsburg 2000.—.

Aliaj valutoj:

Orzech en Inowroclaw pmk. 400.—, Anafryev en Elva emk. 10.—, Müller en Wien li akr. 1000.—, Ehrenreich en Wien li akr. 1000.—, Protopopov en Valk emk. 1000.—, Lindberg en Parola fmk. 25.—, Luyken en London 1.—, Bischof en Wien akr. 1000 — Medem en Kaunas lit. 10.—, Jarocki en Nieswiez pmk. 1000.—, Keltek en Zagreb din. 5.—, s-ino Keltek en Zagreb din. 5.—, D-ro Sigel en Detroit Mich. dol. 1.—.

Literaturaj Manuskriptoj.

Al ĉiuj sendantoj de literaturaj manuskriptoj ni scigas, ke ni neniam plu povas respondi, ĉu ni represas la verkaĵojn aŭ ne. Pri tio decidus nur la sendintoj de bonvolu dadi enen la jenan rubrikon, en kiu ni respondos al ĉiu tuj post decido pri akcepto aŭ neakcepto. Kiam ni enprezas la akceptitan artikolon, tio dependas de aktualeco, disponebla spaco kaj aliaj cirkonstancoj.

Ricevitaĵ:

576. Se via malmaliko mallaŭtas (E. L. O.), 577. Unu paĝelo el 1921-a jaro (A. V.), 578. Al mi ŝajnas . . . (St. Z.), 579. Vi memoras (St. Z.), 580. Paŝao Hasan (St. Z.).

Najbaroj aŭdis tiun bruon kaj matene demandis lin pri la kaŭzo. Li respondis, ke li disputadis kun sia edzino.

„Sed pro kio estis tia klakado?“

Li respondis: „Dum la disputado mia edzino koleriĝis kaj piedpuŝis mian veston, kiu falis trans la ŝtuparon.“

La najbaroj denove demandis: „Sed falo de vestoj ne povas kaŭzi tiel laŭtan klakadon?“

Tiam Nazredin' respondis: „Kial vi altrudas vin? Mi mem estis ja en tiu vesto.“

IV.

Jumatene Nazredin' venis bazaron, plenigis per aĉetitaj legomoj siajn du korbojn, ŝnurligis la korbojn sur sia dorso, sidliĝis sur sian azenon kaj ekrajdis heimen.

Konato, renkontinte lin, demandis: „Kial vi, sinjoro, ne alligas la korbojn al la selo de via azeno?“

Nazredin' respondis: „Kial tiu ĉi malfeliĉa besto estu portonta tiom da ŝargo?“

V.

Foje Nazredin'-ĥoĝa venis en „amam“ (turka banejo). La banservisto donis al li malnovan viŝilon, malpuran tukon kaj entute malbone servis al li. Nazredin' diris nenion, sed kiam li estis eliranta el banejo, li jetis al la servisto dek „aspri“ (monero), grandan sumon, kiun povis pagi tiutempe nur riĉeĝaj homoj. La servisto miris.

Post unu semajno Nazredin' venis denove en la banejon. Nun la servisto vartis lin kun eksterordinara peno. Nazredin' diris nenion, sed elirante donacis al li nur unu aspri. La servisto miris eĉ pli multe kaj demandis: „Kion signifas tio, sinjoro?“

Tiam Nazredin'-ĥoĝa respondis: „Tiu ĉi unu aspri estas pago por la pasinta bano, kaj la antaŭaj dek aspri por la hodiaŭ.“

